

# FRANCA

LA HOUSSAYE EN BRIE  
77610 FONTENAY TRESIGNY  
FRANCE

# KATOLIKA ESPERANTISTO

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★  
(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto: S-ro R. Cl. COLAS 6, rue de Mézières 75006 PARIS  
Sokr: F-ino G. PREUX 55/3 Rés. La Terrasse Rue du 11 nov. 59290 WASQUEHAL  
Kasistino: S-ino J. VINCENT L' Oazo B. P. 54 49150 BAUGE  
Peranto IKUE: P-ro R. DEGRELLE B. P. 23 54510 TOMBLAINE

C.C.P. Association Catholique Française pour l' Esperanto 2324 93 N. ROUEN

==== La n°: 6 F. Abono: 23 F (TTC), Kotizo: 7 F. Sumo: 30 F. ====

+++++

N.B. La materialon por la bulteno oni sendu al S-ino Vincent nepre antaŭ  
la 5-a de februaro, majo, aŭgusto kaj novembro.

+++++

==== N° 146 ==== BULLETIN TRIMESTRIEL ==== TRIMONATA BULTENO ====  
\*\*\* Sankta PIO X-a, preĝu por ni. \*\*\*

==== SEPTEMBRO 1985 ====

+++++

## BILETO DE LA PREZIDANTO

Après le congrès de notre association, dont nous devons le succès à notre ami Eloi Thiollière et aux espérantistes de Saint-Etienne qui lui ont apporté leur concours, quatre membres de notre Comité Directeur se sont retrouvés à Augsburg, pour participer au congrès oecuménique organisé en commun par IKUE et KELI. Cette semaine de rencontre a été caractérisée par un esprit fraternel entre espérantistes catholiques et protestants, une communauté de prière, une même méditation des sources de la foi chrétienne, un même regard sur l' attitude chrétienne dans notre monde moderne.

Si ces jours passés dans cette ville où se consumma le drame de la déchirure, où tant de lieux évoquent le passage de Martin Luther, avivent la soif de l' unité, de telles rencontres marquent comment une reconnaissance mutuelle conduit ceux que tant de choses ont séparés et séparent encore, à regarder ensemble dans le sens de l' annonce du salut en Jésus-Christ.

Mais ce qui donnait toute sa valeur à une telle réunion internationale, et interconfessionnelle, c' est que l' usage d' une langue commune, pratiquée par tous, permettait à tous les moments des échanges sans ces difficultés, sans ces incompréhensions, sans ces impossibilités de communiquer telles que dans des réunions multilingues: 150 adhérents, une vingtaine de nationalités fondus dans une même communauté, unis dans un même esprit servi par un même langage, tel est le privilège offert par l' emploi de l' Esperanto.

Il convient de rendre hommage aux organisateurs, et parmi eux aux deux animateurs, le père Eichkorn et le pasteur Burkhardt, qui ont su donner à ces réunions le caractère religieux et fraternel, dans le respect mutuel des particularités de chacun de nos groupes, tant dans les temps de prière et d' échanges vécus ensemble que dans les cérémonies liturgiques propres à chaque confession; à noter la chorale qui s' est formée spontanément et s' est exercée quotidiennement sur un répertoire déjà riche de chants religieux et liturgiques, ainsi que la prière chantée des "heures" où la chapelle résonnait trois fois par jour des psaumes en notre langue commune.

..//...

Mais, au retour des vacances, nous retrouvons nos tâches et nos engagements. Que nos lecteurs veuillent bien relire notre "biletto" de juin, et y retrouver les thèmes de réflexion et d' action qui leur étaient soumis ... et que nous retrouvions ainsi les occupations et les activités vers lesquelles nous nous sentons appelés. Et que Dieu nous aide.

R. Cl. COLAS

AUGSBURG 1985

Pastron Eichkorn kaj Pastoron Burkhardt ni dankeme gratulas, pro la frata kaj kristana etoso en la augsburga kongreso. Dank' al tre lerta organizado, la tempo de nia kunvivado estis tre bone okupita. Kunvenoj, preĝoj, kantoj, randoj, prelegoj kunigis ĉiutage la kongresanojn, ĉu komune, ĉu por ĉiu konfeso en propraj diservoj.

Dimanĉon, sub la volboj de la belega katedralo, solena meso unuigis la germanajn paroĥanojn kun la esperantlingvanaj gastoj, kunuzante ambaŭ lingvojn. Samtempe, evangelia diservo okazis por la protestantoj en la historia preĝejo S-ta Anna, kie oni konservas la memoron de Martin Luther.

Sed, en tia okazo okazis speciala renkontiĝo de la IKUE-kongresanaro. Ni liturgia vivadis tiujn momentojn, ĉu en la ĉiutaga meso, ĉu en la horpreĝoj ĉantaĵoj laŭ la tradiciaj arioj.

Niaj kunvenoj temis pri diversaj aferoj publikigitaj en "Espero Katolika" Ni citu tamen la projektojn efektiviĝi la tradukon kaj eldonon de la necesaj verkoj, ĉefe de la plena Sankta Biblio, tasko nun devige ekumena. Ankaŭ mankas taŭga meslibro, necesega por akiri definitivan agnoskon de la celebrado en Esperanto. Tiaj tradukoj devas esti subtenataj de ĉiuj katolikoj esperantistaj, kaj tradukistoj devas klopodi por eldoni indajn librojn, lingve perfektajn kaj konformajn al la originalaj tekstoj, por esti aprobitaj de la aŭtoritatuloj.

La Centra Oficejo de IKUE planas la presadon de la historio de IKUE, okaze de la jubilea jaro de Esperanto. La estraro proponas kampanjon por informi la episkopojn kaj pastrojn, kaj starigi fonduson por efektiviĝi tiajn taskojn. Alvo- kon oni sendos al ĉiuj landaj ligoj.

R. Cl. COLAS

XX

KRISTANECO

Sinjoro,  
Ni foje demandas nin,  
kio estas kristaneco.

Instruu nin,  
Ke ne estas ami la aliajn.  
- La nekredantoj faras la samon -

Sed tio estzs scii:  
Ke vi amis nin la unua  
Kaj volas kunligi nin ĉiujn  
En la Regno de la Patro;

Ke la kristanoj  
Devas anonci al ĉiuj  
Tiun ĝojigan novaĵon.

Jean COUTELIER

XX

NOVAJ MEMBROJ 1985

- 11) S-ro DESCAMPS (P-de-D); 12) S-to CÔTE (Rhône); 13) F-ino MALAURE (Loire); 14) S-ino LEMAITRE (Drôme).

Ni deziras al ili plej koran bonvenon en nia rondo.

\* \* \* \*





EN TRAJNO

Ruliĝas radoj de la trajno sian vojon.

Denove mi veturas - jam kioman fojon?

Min vualigas milde luliganta varmo, ~~de xxxxxxxxxxxxxx xxxxxx xxxxxxxxxx~~

de trapasantaj bildoj monotona ĉarmo;

siĝnado al komforto kaj al la trankvilo

de la naskiĝo jam konata veturilo

min kvazaŭ karesante influadas pace

en sia movo ien mole kaj senlace.

Forgesas tute mi, ke estas mi grizhara,

el mi perdiĝas ĉio zorga kaj amara,

por mi plu ne ekzistas la enuaj devoj,

raveme ĉirkaŭvolvas min la dolĉaj revoj,

ili ekregas min libere kaj senlime

per io, kio estas tiel malproksime,

ekster la ĉiutago grize ordinara.

En pensoj venas mi al sabla bordo mara,

aŭ al la kampo, kie ondas la tritiko,

aŭ min atendas ie bunta ekzotiko?

Mi ne rimarkas sur haltejoj la paserojn,

nek apude la maltrankvilajn pasaĝerojn.

Okulojn fermas mi kaj rekte, sen obstakloj,

okazas en la mondo, plena de mirakloj.

Benitaj estu homoj elpensintaj la fervojon,

al ĉiuj ĉiam ĝi donacas ĝojon,

forulojn ĝi sen ia peno unuigas,

amikojn sur terglobo kun plezuro ligas,

per ĝi pri vojaĝado la sopiro febla

farigas el neebila en la atingebla.

A. APOLLO (Tallinn, 18/1/1985)

+++++

MIA FATO

Mia fato  
kiel gvato  
min atendas kun la bato,

Ĝi min ĉesas,  
ne forlasas,  
ĉie sin perfide kaŝas,

Ĝia nomo  
eĉ en domo  
persekutas kiel homo,

se ĝi iam  
donas ian  
bonon, pagas mi ja ĉiam,

hipokrite,  
ofendite  
laŭdas min neatendite.

Fato tia -  
puno mia,  
povus esti ja alia,  
pli bonvola,  
kaj pli mola,  
febla estas mi kaj sola.

Kion fari -  
Ĉar mi fali  
povas, se kun ĝi batali,  
eble, iam  
en alian  
ŝanĝos karakteron sian,

tiam mi ja  
kaze tia  
ĝojus pro la fato mia.

A. APOLLO (12/4/1985)

+++++

AL BUDAPEST

Kio iam estis -  
tio restis

A. APOLLO  
(24/5/1985)

ĉiam en memoro  
kaj en koro:  
la Danuba valo  
en vualo,  
la rivera fluo,

Ĝia bluo,  
de la pontoj belo,  
blanka velo,  
la hungaraj fratoj  
sur la stratoj.  
Volus mi reveni  
kaj vin beni.

